DIA REGNO
ISSN 0167-9554

# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ N-ro 5 (842) 2003 ✪



**Kongresanoj antaŭ la preĝejo. Fotis Siegfried KRÜGER**

# *KONGRESA NUMERO*

## KELI

**Kristana Esperantista Ligo Internacia fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto:** Jacques Tuinder
✉ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH Heemskeerk ✆+31 251 231941;
💻 d.tuinder-dekker@wolmail.nl

**Sekretario:** Els van Dijk-Kuperus
✉ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando; ✆+31 1724 20222;
💻 j.a.van.dijk@hetnet.nl

**Kasisto:** Siegfried Krüger
✉ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074 Heilbronn, Germanio; ✆+49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.
http://www.chez.com/keli/

## DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908 dumonata revuo — ISSN 0167-9554**

**Redaktoro:** Philippe Cousson
✉ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆+33 (0)5 49 46 80 21; 💻 diaregno@altern.com.

**Abonprezo** sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado kaj ekspedado:**
Eldonejo HEJME Kazimierz Leja
✉ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
✆+4832 2650038; 💻 esperanto@hejme.e-tools.pl


## ENHAVTABELO


99 16a Ekumena Esperanto-Kongreso, Rimini
101 Protokolo de la KELI-kunveno
Raporto de la redaktoro
103 Pastoro Paul Schneider — „la predikisto de Buchenwald"
104 Dietrich Bonhoeffer
107 Bernhard Lichtenberg
108 Ankaŭ al mi Dio diris NE
109 Kiam Dio diras „NE"
110 Ekumena kristanismo kaj paco
111 Ekumenaj eklezioj tagoj en Berlino
112 Prediko de Gerrit Berveling dum OSIEK-konferenco
114 Ekskurso al Ravenna kaj prelego pri la mozaikoj
117 Libera Eŭropa Universitato de AIS en Komarno
118 Lumo aŭ mallumo
119 Festlibro por Adolf Burkhardt
120 La Dua Balta Esperanto-Forumo
— kaj apud ili kutimaj eroj...


### Redaktoraj vortoj

La Biblion ni ricevis de Dio, ne por ni mem, ne por flegi nian spiritan vivon, sed por transdoni al aliaj, al aliaj kiuj ne konas ĝis nun ŝian valoron. Pli ĝuste diri, ne NUR ni.

Tio estis la moto de la prelegintoj en mia urbo dum la okazaĵoj de la jaro de la Biblio. Same en Esperantujo. Tiun Biblion, kiu nutras nin, kiu vivigas nin, kiun ni kune legas kaj prikantas, ni ne devas gardi por ni, instali sur bretojn. Ĝi estas por diskonigo, por ke la Esperantistoj (ek)konu ĝin, kaj ĝian veran esperon.

Korajn salutojn al ĉiuj.

Philippe Cousson



# 16a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO, 30.8. — 6.9.2003 EN RIMINI

Kongresa temo: Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1,8; Adoru 560), salo kaj lumo por la mondo (Mat 5,13-14).

KELI kaj IKUE havis bone preparitan, komunan kongreson en Rimini kun riĉa programo. Bedaŭrinde la KELI-anoj estis minoritato kaj partoprenis ankaŭ nur unu prostestanta pastoro. ADORU montriĝis denove kiel bona ekumena ilo kaj trezoro. La baza ekumeno bone funkciis, suferige spertebla estis la sinteno de unuopuloj rilate al ekumuna diservo kun eŭkaristio.

Ni povis partopreni diverskonfesiajn diservojn. KELI-anoj sekvis ankaŭ la inviton al loka komunumo de la Valdanoj, kie okazis dulingva Diservo.

Riĉa estis la programo kongrestema, distra, muzika kaj ekskursa:

Enkondukis la temon Miloslav Švaček, CZ.

Kantkoncerto kun Anna Laszay, HU (*Anjo Amika*).

Publika orgena koncerto kun Ernst Leuze, DE.



ADORU-antoj: p. Eichkorn, Burkhardt, Kronenberger kaj Ernest Leuze. *Fotis: S.K.*

Lumbildprelego pri mezepoka arthistorio de Nord-Italio kaj Ravenna; Zoltán Someghyi, HU.

Ravenna: Ekumena renkontejo de Oriento kaj Okcidento; mons. Giovanni Balconi, IT.

*Evidente* — mia mondvasta laboro por blindaj homoj, Jacques Tuinder, NL.

Skriba atestado tra jarcento: *Espero Katolika* 100-jariĝas; Carlo Sarandrea, IT.

Pri la martiroj — la plej konvinka ekumeno; Riccardo Larini, IT.

Edith Stein: Atestantino de la kruco inter racio kaj kredo; Prof. Roberto di Ceglie, IT.

Rusaj ortodoksaj martiroj sub la ateisma komunista diktaturo; Sac. Lalenkov.

La kredatestanto Florenskyi, ortodoksa martiro; Prof. Valentini.

La vivo de Max Josef Metzger; Sac. Albrecht Kronenberger, DE.

La vivo de Sankta Brigitta; Arne Lundkvist, SE.

Atestantoj kaj viktimoj dum la hitlera reĝimo en Germanio: Dietrich Bonhoeffer (Adoru 490), Jochen Klepper (Adoru 011, 120, 194), Paul Schneider; Siegfried Krüger, DE.

Angelus Silesius — Silezia mistikisto; d-ro Gottfried Noske, DE.

Ne ĉiuj programeroj estas menciitaj. La venonta 54a KELI-kongreso 31.7.-7.8.2004 estos en Bystrice pod Hostýnem, Ĉeĥio, en eklezia domo *Sola Gratia*. La Graco estos ankaŭ la temo de la kongreso. Solvenda ĝis tiam estas la po-

steuleco por la prezidanto, la sekretario kaj la redaktoro.

Siegfried KRÜGER, KELI-kasisto

Hieraŭ nia familio revenis de la 16a Ekumena Esperanto-Kongreso en Rimini (30.08.-06.09.2003), kun ĉirkaŭ 300 partoprenantoj eble la plej granda Ekumena Esperanto-Kongreso ĝis nun. Ni bone vojaĝis tien kaj reen preskaŭ senpage per Ryanair-flugo. (Kvankam ni teorie preferas trajnvojaĝojn, ni ne povis rezisti al flugbiletoj de Hahn al Forli por 20 EUR, kaj do aĉetis ilin jam antaŭ duona jaro).

La kongreso okazis en la paroĥejo de la esperantista pastro Duilio MAGNANI, kiu ornamis sian preĝejon per belegaj, daŭre ampleksigataj mozaikoj kun esperantlingvaj tekstoj. La dua avantaĝo de tiu paroĥejo estas ĝia situo nur kelkcent metrojn for de mondfama plaĝo, kie la kongresanoj povis bani sin en la ankoraŭ varma akvo de la Adriatiko dum la preskaŭ ĉiam tre agrabla somerfina vetero.

Ankaŭ ĉirkaŭ 50 gejunuloj (plejparte



*Partoprenintoj de la jarkunveno: Werner FABER, Pavel POLNICKÝ, Iren BAGI, Zoltan SOMEGHYI, Vera TUINDER, Siegfried KRÜGER, Maria LASZLO, Jacques TUINDER, Arne LUNDKVIST, Andrei TASMADI.*



*Ernst Leuze ekzercas kun grupo da rumanoj por diservo. Atentu la belan mozaikon dekstre. (SK)*

el Ĉeĥio, Pollando, Rumanio kaj Hungario) partoprenis la aranĝon kaj loĝis kune en hotelo vidalvide de la kongresejo. Plejparte ili estis komencantoj, kiuj vigle partoprenis en tri internaciaj konversaciaj kursoj.

La programo plejparte tre bone sukcesis. Okazis ekskursoj al San Marino kaj Ravenna (dum ideala vetero) kaj multaj prelegoj kaj diskutrondoj, el kiuj mi bedaŭrinde (kiel gvidanto de lingvokurso kaj patro de 13-monata filineto) povis ĉeesti nur malmultajn; sed vere interesa estis ekzemple diskuto kun la juna seminariano Louis MBELLA el Kamerunio pri disvastigo de Esperanto kaj bonfara agado en Afriko.

Ĝojiga estis la multnombra partopreno en la elektoj de la nova IKUE-estraro; mi aŭdis ion pri 300-400 voĉdonintaj membroj (inkluzive de la poŝtaj voĉoj senditaj antaŭ la kongresoj). Elektiĝis kiel nova prezidanto de IKUE Miloslav ŜVAĈEK el Ĉeĥio; vicprezidantoj fariĝis Marija BELOŠEVIĆ el Kroatio kaj pastro Lajos KOBOR el Hungario.

En 2004 ne okazos Ekumena Kongreso, sed IKUE-Kongreso en Kretinga en Litovio (apud la Balta Maro, 3.-10.07.2004) kaj krome KELI-kongreso en Ĉeĥio (proksime al Brno?).

Por 2005 KCE invitis al Ekumena Esperanto-Kongreso en La-Chaux-de-Fonds. Certe la invitintoj, por kiuj parolis Perla MARTINELLI, celas per tio proksimigi la du asociojn IKUE kaj KELI al la Pakto de la Esperanta Civito, do al asocio certagrade konkurenca al UEA. Ne estas tute klare, ĉu IKUE kaj KELI akceptos la proponon; tamen laŭ mi indas elprovi la kunlaboron.

Ulrich MATTHIAS

**Protokolo de la KELI-kunveno en Gotenburgo je la 31a de julio, 16.00 h. ĝis 18.00 h.**

Nia gvidanto de la kunveno estis pastoro Leif NORDERSTORM el Svedio. Dum la kunveno ni kantis kelkajn kantojn el nia kantlibro „Adoru" i.a.: *Se donas Di' al vi favoron, Porti mi volas Vian mesaĝon, Donu gloron al Di', Amo de Dio estas kiel strando, Donu nun okulojn.* S-ino Anna LANDFORS akompanis nin per gitaro dum la kantoj.

Ĉeestis proksimume 60 personoj. Pastoro Leif NORDERSTORM ricevis leteron de nia prezidanto s-ro Jacques TUINDER. Li laŭtlegis lian leteron. Bedaŭrinde s-ro J. TUINDER ne povis ĉeesti nian kunvenon. Li deziras al ni bonan kunvenon.

Pastoro Leif NORDERSTORM ankaŭ laŭtlegis leteron pri la malsaneco de pastoro Adolf BURKHARDT. Baldaŭ oni operacios lin.

En la kunveno ĉeestis pastro Albrecht KRONENBERGER, kiu gvidis kune kun pastoro Leif NORDERSTORM la ekumenan Diservon je la 27a de julio en la katedralo de Gotenburgo „Domkyrka".

S-ro Pavel POLNICKÝ organizos la KELI-kongreson en Ĉeĥio la sekvontan jaron.

Pastoro Leif NORDERSTORM ankaŭ menciis, ke ekzistas disko de *Adoru* kaj bibliaj tekstoj.

En aŭtuno oni eldonos la novan Biblion kun la duakanonaj libroj, tradukitaj de pastoro Gerrit BERVELING el Nederlando.

Poste estis tempo por la ĉeestantoj paroli pri diversaj temoj. Kelkaj alparolis nin.

Kiam ni finkantis la kantojn tiam s-ro Arne LUNDKVIST prelegis por ni pri la sanktulino Birgitta el Svedio.

La tempo forflugis kaj pastoro Leif NORDERSTORM fermis nian kunvenon kun danko al la ĉeestantoj.

Gerda DERCKS, NL

## RAPORTO DE LA REDAKTORO

Ne oftas kongresoj, kie mi ne troviĝas. Tial mi kutime ne verkis raportojn, aŭ simple prezentis ĝin dum la jarkunveno. Ĉijare mi ne ĉeestas, ĉar mi laboras. Mi do estas devigata verki raporton. Jen ĝi, malfrua. Mi ne scias ĉu vi surpapere legas ĝin, aŭ ĉu iu voĉlegas ĝin al vi.

Nun, ni troviĝas en la kvara jaro de la nova periodeco kaj nova vesto de la revuo. 22 numeroj aperis kaj mi preparas la 23an.

Sur la titolpaĝo de la 4a numero de 2000, mi indikis: La redaktoro bezonas tekstojn. Mi devas tamen konfesi ke nur kelkfoje mi havis problemojn plenigi la numeron. Kelkaj kunlaborantoj sufiĉe regule sendas materialon, kaj el tiuj variaj ↳

fontoj naskiĝas varia revuo. La enhavo estis foje pli Esperanta, foje pli biblia, foje pli eklezia, ofte tre kongresa. Kelkaj ne ŝatis tiun aŭ alian numeron, ĝuste pro tiu ŝanĝiĝanta enhavo. Kelkaj gratulis pro tiu aŭ alia numero same pro la enhavo. Tamen, la konkludo devas esti, ke la KELI-anoj malsamas, kaj ke tiu diferenco vidiĝas en la diverseco de la enhavo de la revuo. Restas de tempo al tempo, leganto kiu diras ke io mankas. Tiam mi rediras, kion mi jam ofte diris kaj skribis: Se vi pensas ke io mankas, verku mem.

Evoluo en la maniero konstrui la revuon venas de la rimedoj sendi la artikolojn kaj interrilati kun la presisto, nia membro Kazimierz Leja. Nun, la gravan rolon havas la Interreto. Multon mi ricevas per ĝi. Ĉion (preskaŭ) mi resendas al Kazimierz per ĝi. La provaĵojn mi ricevas per ĝi. La planon kaj korektojn mi sendas per ĝi. Eĉ en ĝi mi trovas tekstojn, kiun mi uzas. Tio signifas, ke kontribuaĵojn ricevitajn per helika poŝto (t.e. normala poŝto) nun pli kaj pli maloftas. Ilin mi devas retajpi aŭ skani, pretigi antaŭ ol sendi. Eĉ foje mi sendis ilin rekte per sama poŝto al Kazimierz, kiu faris la pretigon.

De la pasinta kongreso, ni modifis la funkciadon de la rilatoj inter Kazimierz kaj mi. Kaj laŭ mi, tio nun finfine plibonigas la tuton. La tekstojn oni sendu al ambaŭ se rete, al li se poŝte. Kiam mi ricevas aŭ trovas interesan tekston, mi resendas al li. Li pretigas la provaĵojn, kiujn li sendas al mi. Mi tiam (t.e. 6 foje jare) korektas, konstruas la planon de la numero, kaj sendas ĉion al li, kiu faras kaj eldonas la numeron. Dum tro multaj numeroj, la prokrasto estis miakulpa, sed mi pensas ke la ritmo akirita en la lastaj numeroj povas daŭri kontentige. Kaj, eĉ se ankaŭ li ne ĉeestas, mi volas danki lin pro lia laboro super nia revuo.

Leterojn mi nur tre malofte ricevas rilate al la enhavo. Ĝenerale, en revuoj, troviĝas parto sufiĉe grava, se ne en grandeco, almenaŭ en sukceso, t.e. la leteroj de legantoj. Ŝajne la legantoj de *Dia Regno* ne ŝatas legi la leterojn de la aliaj, ĉar ili mem ne skribas. Tio signifas, ke ni stiras la revuon en preskaŭ mallumon, ĉar ni apenaŭ scias, kion Vi pensas. Reagoj gratulaj aŭ malgratulaj estas ne nur aprezataj, sed necesaj.

Mi nun venas al la perspektivoj. Efektive, por *Dia Regno*, ni ne havas iun difinitan eldonpolitikon. Kion puŝi, kien iri, kiun celi? Fakte, mi kunmetis numeron post numero per la materialo ricevita. Tio estis mia simpla politiko: elekti inter la diversaj kontribuaĵoj. La rezulto tamen ne estas tro malbona. Sed, estus tamen utile havi iun celon, iujn gvidliniojn. Se vi havas ideojn tiurilate, proponu ilin, ne post du pliaj jaroj. Eble rilate al tio, ni povos pli detale paroli en Ĉeĥio venontjare, kiam ideoj jam estos alvenintaj.

Por konkludi, mi povus kompreneble danki al multaj homoj. Mi volas danki, krom al Kazimierz, ankaŭ al Jacques kiu, kiam li povis, partoprenis en korektado, al ĉiuj kies nomojn vi legis en diversaj numeroj.

Ĝis baldaŭ en la venonta kongreso kaj en la venontaj numeroj de *Dia Regno*.

Philippe Cousson



# «VI ESTOS MIAJ ATESTANTOJ»

## Pastoro Paul Schneider, „la predikisto de Buchenwald"

Naskita la 29an de aŭgusto 1897, kiel filo de pastoro Gustav Adolf Schneider kaj Elisabeth, Katharin Schnorr. 1912 konfirmaciita de sia patro. Studis teologion en Giessen, Marburg kaj Tübingen.

Li aliĝis al la „Konfesanta Eklezio", protestis kontraŭ artikolo de SA-ĉefo Röhm. Oni malpermesas al li prediki. Plurfoje li estis arestita. La 27an de novembro 1937 kaptitata en la koncentrejo Buchenwald apud Weimar. Schneider havis grandan familion kun ses infanoj, tamen lia edzino aprobis lian reziston kontraŭ la naziistoj kaj kunportis la konsekvencojn.



Je la naskiĝtago de Hitler, okaze de flaga apelo en la koncentrejo por ĉiuj li rifuzas respekte depreni sian ĉapon — sekvis pli severa unuopa aresto.

Tra la prizona fenestro li komencas regule alparoli la kaptitojn (milojn) sur la apela placo, laŭte kriante bibliajn vortojn, konsolojn, kuraĝigojn, akuzojn kontraŭ la SS-anoj. Pli kaj pli sekvis kruela turmentado fare de la KZ-ĉefo.

La 18an de julio 1938, la koncentreja kuracisto murdas lin per troa dozo de strofanteno. La entombigan ceremonion partoprenis la tuta loĝantaro de Dickenschied, protestantoj el Nederlando, Svisio kaj 200 evangeliaj pastoroj en taloroj akompas lin al lia tombo.

Papo Johano Paŭlo la dua aprezis Paul Schneider en la jaro 2000, anstataŭante ĉiujn Protestantojn, kiuj pagis la fidon al la kristana kredo per la vivo. La katolika eklezio akceptis lin 2003 en la vico de „Sango-Atestantoj de la 20a jarcento", kaj dediĉis al li kaj aliaj kune la preĝejon Bartholomäus en Romo, kie okazis Diservo memoriga.

Kompilis Adolf Burkhardt kiel nur akompanantan tekston por la ekspozicio en Rimini. Li preparis ankaŭ prelegon, kiun li pro malsaniĝo ne povas prezenti.

# «VI ESTOS MIAJ ATESTANTOJ»

## Dietrich BONHOEFFER (1906–1045)

La kongresa temo instigis min prezenti al vi Dietrich BONHOEFFER, martiro dum la hitlera reĝimo. Li estis germano, Berlinano kaj protestanto kiel mi, kiu hodiaŭ nur estas atestanto de rimarkinda atestinto. Des pli, ĉar en ADORU li estas honorigata per la kanto 490, kiun tradukis Adolf BURKHARDT.

La teksto estas parto de poemo, verkita en kela malliberejo en Berlino je la jarŝanĝo 1944/45, kiam li skribis leteron okaze de la patrina naskiĝtago ankau al sia fianĉino. Tio estis 4 monatoj antaŭ sia mortigo kiam li havis 38 jarojn.

La versoj fariĝis por sennombraj homoj fonto de firma espero kaj konsolo. En ADORU mankas la unua kaj la kvina strofo de la poemo (kiu rilatas al la jarŝanĝo), kaj pro tio la kanto ankaŭ hodiaŭ pova peri ĝian sentempan mesaĝon.

Nun mi iomete skizos la biografion de Dietrich BONHOEFFER:

1906 naskiĝis en Breslau kiel sesa el ok infanoj; la familio, en kiu Dietrich elkreskas, apartenas al la klera elito en la germana regno,

1923 teologia studado en Tübingen, Romo kaj Berlino,

1928 vikario en Barcelono,

1931 studrestado en Nov-Jorko, pastoro por studentoj en Berlino,

1933 eksterlando-pastoro en Londono kaj teologia konsilanto de la Ekumena Konsilantaro de la Eklezioj,

1935 estro de la predikista seminario de la konfesanta eklezio en Finkenwalde apud Stettin,

1936 nuligo de la instru-permeso por BONHOEFFER,

1937 fermo de la seminario pere de la „Gestapo" (sekreta ŝtata polico); daŭrigo kontraŭleĝa,

1940 komenco de la konspira agado kiel kuriero de la rezist-grupo en la hitlera organizo „defendo",

1943 aresto pro rezisto kontraŭ la naziisma reĝimo (18 monatojn en Berlin-Tegel, 5 monatojn en la Gestapo-kelo en Prinz-Albrecht-Str., 2 monatojn en la koncentrejo Buchenwald,

1945 ekzekuto per ŝnurego en la koncentrejo Flossenbürg, kvar semajnojn antaŭ la senkondiĉa kapitulaco de Germanio.



*Dietrich BONHOEFFER en la esplor-malliberejo. Berlin-Tegel, somere 1944.*




*Siegfried KRÜGER prelegas pri Dietrich BONHOEFFER.*

Kial unuopaj kristanoj (apud sufiĉe multaj aliaj homoj) riskis ilian vivon protestante kontraŭ la hitlera reĝimo?

Post demokrata decido HITLER kiel estro de la partio de la naziistoj pli kaj pli nuligis demokratajn principojn kaj diktatoriĝis. Li estis katolikdevena, tamen rasisto kaj komencis agadon kontraŭ la judoj. Preparante la agadon li provis elimini la proteston de la eklezioj:

— Kun la katolika eklezio li kontraktis konkordaton,

— kun la protestanta eklezio li provis organizan ŝanĝon kaj inventis la eklezion de la „Germanaj Kristanoj". El la ĝistiama eklezio elkreskis la rezistanta „Konfesanta Eklezio", al kiu ankaŭ apartenis BONHOEFFER.

En la unua tempo kaj ankaŭ jarojn pli poste de la naziista registraro HITLER estis entuziasme akceptita. Ankaŭ fare de la eklezioj. Kun la kreskanta influo de la Germanaj Kristanoj problemiĝis la sinteno al la judoj. La Germanaj Kristanoj kaj la ŝtato postulis „germandevenan eklezion". BONHOEFFER konkludis:

*Eklezio, kiu malmembriĝas judojn, oni devas forlasi. Germanismo aŭ kristanismo, oni ne povas samtempe esti kristano kaj naciisto. Diri tion, estis kontraŭŝtata kaj puninda.*

***Pastro kaj pastoroj devis jene ĵuri:***

*„Mi ĵuras: Mi estos fidela kaj obeema al la regnestron de la germana regno Adolf HITLER, la leĝojn mi observos kaj plenumos miajn oficajn devojn ekzakte, kiel vere Dio helpas min.*

Rifuzi tiun ĵuron havis konsekvencojn. Similis la konduto rilate al la saluto „Heil HITLER". Bonhoeffer pledis por vera, konfesanta, sian Sinjoron sekvantan eklezion kontraŭ altrudanta eklezio, kiu malkonfesas sian Sinjoron pro populareco.

Por reliefigi la situacion en la jaro 1933, mi mencias Diservon en la katedralo de Magdeburgo, kie la altaron ĉirkaŭis „arbaron da flagoj kun hokkrucoj".

BONHOEFFER je la sama tago predikis en Berlino: *„Ni havas en la preĝejo nur unu altaron, tio estas la altaro de la Plejaltulo, ... antaŭ tiu ĉiu kreitaĵo devas genuiĝi. Kiu alian volas, tiu restu ekstere, tiu ne povas esti kun ni en la domo de Dio. En la preĝejo ni ankaŭ nur havas unu ambonon, kaj de ĉi tiu ambono estas parolata la kredo al Dio kaj cetere pri neniu alia kredo aŭ bona volo".*

Multaj en la eklezioj tion ne same klare vidis. Sankta Paŭlo en sia letero al la Romanoj en la 13a ĉapitro skribis:

*Ĉiu animo submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj, ĉar ne ekzistas aŭtoritato, krom de Dio; kaj tiuj, kiuj ekzistas, estas starigitaj de Dio. Tiu do, kiu kontraŭstaras al aŭtoritato, rezistas al la ordono de Dio; kaj tiuj, kiuj rezistas, ricevos juĝon. Ĉar regantoj estas teruraĵo ne al la bona aga-*

*do, sed al la malbona. Ĉu vi volas ne timi aŭtoritatulon? Faru bonon, kaj vi havos de li laŭdon; ĉar li estas la servanto de Dio al vi por bono. Sed timu, se vi faras malbonon; ĉar ne vane li portas la glavon, ĉar li estas la servanto de Dio, venĝanto pro la kolero kontraŭ tiu, kiu faras malbonon...*

Inter 1933 kaj 1939 (komenco de la milito) HITLER havis la subtenon de la plimulto de la germanoj. En 1941 li komencis la finsolvon rilate la judojn. Estis mortigitaj ankaŭ multaj fleghejmanoj kaj senvaloraj homoj, sed ĉifoje ankaŭ elstaraj eklezianoj protestis, parte sukcese. En 1942 HITLER atingis la kulminon de sia potenco kaj ghis 1945 li respondecis la morton de 35 milionoj da homoj.

La verko de BONHOEFFER same kiel lia ĉesigita vivo restis fragmento. Tamen li fariĝis unu de la grandaj instigantoj de la postmilita teologio kaj li ankaŭ ludas rolon en la liberigaj eklezioj kaj movadoj en suda Afriko. Kaŭzo nelaste estas la fascina ligo inter vivo kaj penso. En lia vivo plastikiĝas lia penso, kaj en lia penso trabrilas signifo, kiu postvivas la aktualan historion.

Vivo kaj penso gajnis specialan aŭtoritaton per la martira morto. Baza penso de li estas la senkondiĉa sekvado de Jesuo Kristo kaj vivo laŭ la montprediko.

BONHOEFFER estis eklezi-kritika; spiritan parencecon li havas ekzemple kun Francisko el Assisi, Martin LUTHER kaj kun la frataro de Taizé. Dum la naziisma influado de la eklezioj li baldaŭ konstatas, kie staras la antikristo. Aliuloj ofte estas trompitaj per la maskiĝado de la malbono, kiu kirlis ĉiujn etikajn terminojn: La malbono montras sin en formo de la lumo, de la bonfaro, de la historia necese-co kaj de la sociala justeco.

Li ne kompromisis sed konstatis, ke enirinte malĝustan trajnon ne sufĉas, se oni nur en la flanka koridoro iras kontraŭ la veturdirekto. La instruo el la vivo kaj morto de BONHOEFFER malpli estu la imito, sed la sekvado de Jesuo.

La sekvanta elekto el liaj pensoj kontribuu al pli bona kompreno:

— *Ne ekzistas vojo al paco sur la vojo de sekureco. Ĉar la pacon oni devas riski, ĝi estas la sola granda risko, kaj neniam estas sekurigebla. Paco estas la malo de sekureco.*

— *Libera respondeco baziĝas je Dio, kiu postulas la liberan kredo-riskon de respondeca ago kaj kiu donas pardonon kaj konsolon al tiu, kiu pro tio fariĝas pekulo.*

— *Ekzistas tri eblecoj de eklezia agado:*

— *Unue, la demandoj direktitaj al la ŝtato pri la legitima ŝtata karaktero de ĝia agado; tio estas la respondecigo de la ŝtato.*

— *Due, la servo por la viktimoj de ŝtata agado. La eklezio estas devoligita al la viktimoj de ĉiu sociordo, ankaŭ se ili ne apartenas al la kristana komunumo.*

— *La tria ebleco estas tia, ke oni ne nur bandaĝu la viktimojn sub la rado, sed mem haltigu la radon kaptante la radajn spokojn.*

— *Neniu homo konstruas la eklezion, sed sole Kristo. Kiu intencas konstrui eklezion, tiu certe jam komencis la verkon de la detruo.*

— *La Sinjoro de la tempoj estas Dio. La turnopunkto de la tempoj estas Kristo. La spirito de la nuna epoko estas la Sankta Spirito.*

— *La obeo montras al la homo, ke devas esti dirata al li, kio estas bona kaj kion Dio postulas de li; la libereco lasas al la homo fari la bonon mem.*

— *Eklezio kaj miseklezio ne povas havi komunecon.*

— *Nur kiu krias por judoj rajtas kanti gregoriane.*

— *Kio estas vivo kun Kristo? La eklezio devas ekzemple vivi ĝin.*

— *„Esti-servemaj-por-aliuloj" estas la partoprenado je la estado de Jesuo.*

*Jesuo ne vokas al nova religio; li vokas al la vivo.*

— *La homo estas vokita, kunsuferi la suferon de Dio pro la sendia mondo. Ne la religia ago kreas kristanojn, sed la partoprenado je la suferoj de Dio dum la surtera vivo.*

— *La religieco kondukas la homon en sia mizero al la potenco de Dio en la mondo. La biblio kondukas la homon al la senpotenco kaj la sufero de Dio; nur la suferanta Dio povas helpi.*

— *Kristana komuneco estas unu el la plej grandaj donacoj, kiujn Dio donas al ni.*

BONHOEFFER multe predikis, prelegis kaj verkis librojn:

— Komuna vivo, Postsekvo

ambaŭ pri la Evangelia Eklezio dum la tempo de la Hitlera batalo kontraŭ-eklezia

— Rezisto kaj submeto al la sorto

Leteroj kaj notoj el la aresto

— Etiko

el la postlasaĵo, eldonita de Eberhard BEHTGE.

Okaze de ĉi tiu temo mi nepre menciu katolikan Berlinanon:

## BERNHARD LICHTENBERG (1875–1943)

Sacerdoto, ekde 1900 en Berlino. Li alimaniere ol BONHOEFFER rezistis. Post la transpreno de la regpotenco per la naziistoj li publike predikis kontraŭ faŝismo. En siaj predikoj li alvokis la kredantaron propeti por judoj kaj aliaj kaptitoj en la naziistaj malliberejoj.

1941 li publike protestis kontraŭ la eŭtanazia programo de la naziistoj. 23.10.1941 li estis arestita. 1942 sekvis juĝo pri aresto dujara en Berlin-Tegel. Poste transporto al Dachau, survoje li mortis la 5.11.1943 (68-jaraĝa).

Beatigo en 1996. Memorejo en la preĝejo Maria Regina Martyrum, centra loko de la germanaj katolikoj memori la viktomojn de la tria regno.

**Ĉu la eklezioj sufiĉe kontraŭstaris? Legu la kulpokonfeson:**

## LA KULPOKONFESO DE STUTTGART

La KONSILANTARO DE LA PROTESTANTA EKLEZIO EN GERMANIO en sia kunsido je la 18a/19a de oktobro 1945 en Stuttgart, bonvenigas reprezentantojn de la EKUMENA KONSILANTARO DE EKLEZIOJ.

Ni estas dankaj pro tiu vizito tiom pli, ĉar ligas nin kun nia popolo ne nur granda komuneco de la suferoj, sed ankaŭ solidareco de kulpo.

Kun granda doloro ni diras: Fare de ni estis alportita senfina sufero super multaj popoloj kaj landoj. Kion ni ofte atestis en niaj parohoj, tion ni nun elparo-

## LA KANTO

1. Sub ŝirm' mirinda de potencoj bonaj
l'estonton kun trankvil' atendas ni.
apudas Di' vespere kaj matene,
kaj ĉiun novan tagon sendas Li.

2. Se temp' antaŭa plu turmenton
donas,
se tag' malbona premas per angor',
la savon donu, kiun vi proponas,
ho Di', por nia terurita kor'

3. Kaj se kalikon donas Vi amaran,
sufero-plenan, pezan ĝis ekstrem',
ni prenas ĝin el Via man' amata
dankeme, fidoplene kaj sen trem'.

4. Se tamen Vi ankoraŭ donos ĝojon
pri tiu mond' kaj ĝia brila sun',
ni rememoros la iritan vojon;
nur Via estu nia vivo nun.

5. Dum ĉiu tera bruo iĝas febla,
por ni laŭtiĝu tiu plen-sonor'
el via vasta mondo nevidebla,
akordoj ravaj de l'eterna ĥor'.

Dietrich BONHOEFFER

las nome de la tuta eklezio: Dum multaj jaroj ni batalis nome de Jesuo Kristo kontraŭ tiu spirito, kiu en la nacisocialisma reĝimo de perforto trovis sian teruran esprimon; sed ni akuzas nin, ke ni ne konfesis pli kuraĝe, ne preĝis pli fidele, ne kredis pli gaje kaj ne amis pli arde.

Nun devas esti farita nova komenco en niaj eklezioj. Fonditaj sur la Sankta Skribo, kun tuta seriozeco direktitaj al la sola Sinjoro de la eklezio, ili komencas purigi sin de kredfremdaj influoj kaj ordigi sin mem. Ni esperas al la Dio de graco kaj kompatemo, ke Li uzos niajn ekleziojn kiel ilon kaj donos al ili plenpovon, proklami Sian Vorton kaj efektivigi obeon al Sia Volo ĉe ni mem kaj ĉe nia tuta popolo.

Plenigas nin kun profunda ĝojo, ke ni scias nin kore ligitaj kun la aliaj eklezioj de la ekumena komuneco pere de ĉi tiu nova komenco.

Ni esperas je Dio, ke per la komuna servo de la eklezioj la spirito de perforto kaj de venĝo, kiu hodiaŭ denove volas potenciĝi, en la tuta mondo estos bridita, kaj la spirito de la paco kaj de la amo ekregos, en kiu la turmentita homaro sole trovos resaniĝon. Tiel ni petas en horo, en kiu la tuta mondo bezonas novan komencon: Venu Kreanto Sankta Spirito.

Stuttgart, la 18an/19an de oktobro 1945

Kompilis Siegfried KRÜGER, DE

## Ankaŭ al mi Dio diris NE

Mi kaj multaj gefratoj, kiuj aŭdis pri mia nekontentiga farto dum la ĝisnuna jaro, preĝis ke mi ricevu fortojn por kunlabori en la kongreso en Rimini, por la preparo de kies programo mi dediĉis multe da tempo kaj pensoj, kun karaj pastroj Kronenberger kaj Eichkorn. Kaj mi kaj mia edzino tre senteble spertis la forton kaj potencon de preĝo kiu ĉirkaŭis kaj ĉirkaŭas nin en malfacila tempo.

Sed fine, Dio diris ne: hodiaŭ mi estis en la neŭrokirurgia kliniko de la Universtitato de Tübingen (tie mi komencis kaj finis, iam, miajn teolgiajn studojn). Komputila tomografo rivelis, ke la kaŭzo de mia nebona farto estas cerba tumoro en la dekstra tempia lobo de mia cerbo. Provizore oni nomis daton por neŭrokirurgia interveno — la 4an de aŭgusto. Ĉu tio sukcesos forigi la malbonon el mia kapo, sole Dio scias. Almenaŭ li diris: NE, vi ne iros al Rimini. Sed mi spertas Lian mirindan ĉeeston; la vortoj el ADORU, multaj el ili, ĉiutage konsolas min potence kaj efike. Dankegon al ĉiuj kiuj per siaj preĝoj formis muron ĉirkaŭ mi.

Dio benu!

Adolf BURKHARDT

## KIAM DIO DIRAS „NE" (2 Sam. 7:1–28)

„Se Jesuo diras «jes», neniu povas diras «ne»". Sendube, ĉi tiu diraĵo estas prava. Neniu povas nei tion kion Dio aprobas. Tamen, kio okazas se Dio neus ideon, peton, aŭ demandon? Ĉu iu ajn ŝanĝas ĝin? Iu opinias ke Dio respondas al nia preĝoj en iu de la tri rimedoj, jes, ne, aŭ atendu. Kiam Dio diras „NE", kio estus via reago? Ni vidu situacion en la Sankta Biblio kie Dio diris „NE".

Reĝo David estis unika viro — viro laŭ la koro de Dio (Agoj 13:22). Li estis viro kiu servis kiel bona modelo por la sekvantaj reĝoj post li pro lia justeco antaŭ Dio. Li estis tia reĝo kiu faris nenion sen petante Dion. Dio siaflanke faris lin suksese en ĉiuj liaj klopodoj, sed nur en unu, Dio diris „NE".

David havis ripozon en ĉiuj siaj klopodoj starigante sian regnon, kaj vivis pace en sia palacego. La deziro de lia koro estis konstrui konvenan domegon por Dio. Kutime, li petis de la Dio per informinte Profeton Natanon — la viro de Dio liatempe. Profeto Natan aprobis la la planon konstrui domon por Dio, sed Dio diris „NE".

Oni miras kial Dio diris „NE" al tia bona kora deziro de David. Ni konsideru la plenan respondon de Dio en 2 Sam. 7:5–16:

*„Iru, kaj diru al Mia servanto David: Tiele diras la Eternulo: Ĉu vi kontruos al Mi domon por Mian loĝado?... la Eternulo sciigis al vi, ke domon konstruos al vi la Eternulo. Kiam finiĝos viaj tagoj kaj vi kuŝiĝos kun viaj patroj, Mi starigos post vi vian idon... Li konstruos domon al Mia nomo..."*

Dio ja diris „NE" al la aspiro de David. Tamen, la „NE" respondo estis kun promeso (vidu versiklojn 11b–16). Kiam Dio diras „NE" al nia peto, Li havas ion pli bonan por ni. La kialo estas: *„Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la Eternulo. Kiom la ĉielo estas pli alte ol la tero, tiom Miaj vojoj estas pli alte ol viaj vojoj, kaj Miaj pensoj ol viaj pensoj"* (Jesaja 55:8–9), kaj: *„Ĉar Mi scias la intencojn, kiujn Mi havas koncerne vin, diras la Eternulo, intencojn al bono kaj ne al malbono, por doni al vi estontecon kaj esperon"* (Jer. 29:11).

Ĥizkija ne akceptis la nean respondon de Dio dum Dio diris al li ke li mortos anstataŭ resanigo. Li preĝis kontraŭ la volo de Dio, kaj Dio aldonis kvindek pluajn jarojn al lia vivo. Tiuj aldonaj jaroj estis la malbonaj por li (vidu 2 Reĝojn 20).

Jesuo Kristo akceptis la nean respondon de Dio dum Li preĝis ke Dio formetu la kalikon de la kruco for Li (Lk 22:44). Li eĉ kriis sur la kruco monstrinte la agonion de la nea respondo de Dio al Lia preĝo (Mk 15:34). Tamen la nea respondo de Dio donis al Jesuo la nomon super ĉiuj nomoj (Filipianoj 2:7–11).

Kio estas via reago kiam Dio diras „NE" al viaj petoj? Ĉu vi akceptos la nean respondon de Dio? Memoru, „...*por tiuj, kiuj amas Dion..., ĉio kunlaboras al bono*" (Rom. 8: 28).

pastoro Bayo AFOLARANMI

## Ekumena kristanismo kaj paco. Seriozaj pensoj tra duonseriozaj pripensoj

La venonta kongreso de esperantistoj katolikaj kaj evangeliaj prezentas certe la karakterizojn de tio kion oni jam nomas ekumenismon. Kion oni faras per ekumenismo? Certe ĝi ne malŝatus puŝi al unu sola kristana kredo en ĉio — kio bonŝance jam estiĝas en la esencaj punktoj, kiel la Enkarniĝo kaj la Triunuo —, sed, nun, fakte, ĝi estas limigata al komuna reciproka simpatia atento kaj ankaŭ,espereble, al komuna agado en la fundamentaj temoj de evangelizado. Reciproka simpatia atento kaj komuna evangelizada agado kiuj povas kreski tiom kiom la favoraj cirkonstancoj kaj „la purigado de la memoro" (esprimo de Johano Paŭlo II).

Navigante ĉirkaŭ kaj ene di tiuj faktoj kaj esperoj, mi imagis (piecon mi petas por la fanfaronaj vantuloj!) ke mi estas min elprovanta, dun la Rimini-a ekumena kongreso de esperantistoj, suriri la scenejon por prelegi, la aŭskultantojn mirigitaj, pri io „originala" rilate nian ekumenismon. „Kial ne paroli pri paco?", mi komencus. „Kiel ne ŝatigi, dezirigi, kaj imagigi kunvenon, ekumenan kunvenon, de ĉiuj Kristanaj Eklezioj — katolikoj, protestantoj, ortodoksuloj, anglikanoj ktp — en kiu evidentiĝu ke la kristanoj jam fine atingis la konscion ke por la Evangelio ĉiu milito estas senrajta, estas peko kontraŭ Dio kaj la homaro?

Vere, se mi volas malsuriri ĝis vero, la „originala" propono neniel originalas. Jam antaŭ multaj subtenantoj, ĝin proponis Dietrich BONHOEFFER, kiu spertinte kaj rimarkiginte la karaterizon idolemigan kaj perfortan de naziismo, notadis: *„Nur granda Ekumena Koncilio de la Eklezio de Kristo el la tuta mondo povas paroli tiamaniere ke la mondo, jam en ploro kaj dentogrincado, aŭdu la vorton pri paco, kaj la popoloj ĝojos pro tio ke tiu Eklezio de Kristo disigas, en la nomo de Kristo, la armilojn el la manoj de siaj filoj kaj malpermesas ke ili militu (28 aŭgusto 1934)"*. Vere mi ne scias kiel interpreti „Eklezion de Kristo" kaj ne eĉ kiel legi „ekumenan Koncilion", sed la ideo elstaras klara kaj brlla. Al tiu ĉi (en mia memoro eksparkas memoraĵoj) asociiĝis Max Joseph METZGER, katolika pastro, kroma viktimo, same kiel pastoro BONHOEFFER, de nazioj.

Ne estante sperta pri historio de la eklezioj, mi limiĝas imagi ke tiu ideo trabatiĝis kaj laboriĝis, eble ne tute malkaŝe, ene de la protestantaj eklezioj, kaj fakte, se la memorfideleco ne malfidelas, ĝi aperis dum la Ekumena Konsilo de Vancouver de 1983 kaj dum la Kirchentag de 1985 flanke de ties prezidento, fizikisto kaj filozofo von WEIZSÄCKER; kaj bone kaj efike al ĝi farus belan kronon la sennombraj iniciatoj de la papoj. Ĉu necesas, por la forgesemuloj, memorigi la kondamnon pri naciismoj de Pio XI kaj la „Pacem in terris" de Papo Johano XXIII? Kaj kiel forgesi pri „la senutila masakro" laŭ esprimo de Benedikto XV (rilate al la militobstino de la itala registaro kiu rifuzis pace ricevi, de Aŭstrio, kion celis akiri per milito).

Sendube oni rajtas opinii ke la diskutoj estus varispecaj. Ekzemple, ĉu povas okazi milito justa, aŭ deviga defenda helpo al justulo (ŝtato aŭ socio) agresita? Ĉu licas preventa milito kontraŭ agresiva kaj ekagresema ŝtato? Kaj, kiu rajtas kaj devas rekoni kaj deklari laŭrajta milita defendo? Unu ekzemplo: dum la enlanda hispana milito, unu partio masakradis dekojn da miloj de pastroj kaj engaĝitaj kristanoj... Ĉu licus bremsi — plejbone kondamni — sindefendon aŭ konsenton kun la cirkonstancoj ĝin ebligantaj?

Ĉiukaze, la eklezioj povas krei al si responsularojn — kolektivajn kaj internacie reprezentajn — taŭgajn al orientado en ĉiuj doktrinaj kaj faktaj duboj diŝirantaj juĝojn kaj konsciencojn:

Publika, fare de la reprezentaro de la Kristanaj Eklezioj, en kiuj ĉiuj eklezioj sin devigas obei, havus sendube la forton fordisirigi plej evidente ĉiuspecan kristanan leĝigon al fundamentalistoj ĉiam tentataj pleksi kristanismon al siaj vidpunktoj kaj interesoj.

Ne multe antaŭ, okaze de la iraka milito, iuj presorganoj, diversflankaj kaj diversnaciaj, observis ke la papo sin trovis agi kiel natura lidero de preskaŭ ĉiuj kristanaj eklezioj kaj kristanaj komunumoj, eĉ se ne asociigitaj al Romo sed unuigitaj en la rifuzo kaj kritiko al la logikoj de milito. Nu, tia lidera funkcio povus deveni, eble kun pli granda persvadiga tutmonda influo, el tia proponita organismo, kreuta de la komuna volo de la Kristanaj Eklezioj.

Jen, en Rimini mi provintus fantaziigi (ĉu nur fantaziigi?) pri tiaĵoj kaj samtempe ĉiuj ekumenismemaj kongresantoj havintus impreson esti eta prepara koncilio, koncilio el malalta suba parto de la Ekumeno... trenanta Ekleziojn al la fine efika renkonto por, trans doktrinaj diferencoj aŭ historiaj disputoj, fariĝi lumo al la mondo ankaŭ tra tia problemo, la plej grava eble tra la nuna homaro; kaj havintus impreson ekdikti la estontan ekumenan evangelian dekalogon de paco...

Kaj, male (se mi povus partopreni), mi restus en la subestrado por aŭskulti karajn amikojn, kiuj timas, ĉe okdekjarulo kiel mi estas, aperi tro junaj, dum ili restus nur sendiversa observado.

Kun kompatpetaj salutoj

Armando ZECCHIN

## EKUMENAJ EKLEZIAJ TAGOJ EN BERLINO

### „Messegelände" apud Funkturm 28.05–1.06.2003

Dimanĉe la 25an de majo mia amikino Astrid HANKE kaj mi iris per trajno al Berlino. Astrid HANKE estis la respondeculo de la Esperanto stando en la AGORA halo 3.2 A 18.

Kunlaboris: la Germana Junularo, Internacia Katolika Esperanto Ligo, Ekumena Esperanta Ligo. En la stando estis 19 helpantoj.

Mi kunprenis kelkajn nederlandajn informmaterialojn el Nederlando kaj mi metis ĉion en la Esperantan standon. Pro tio mi havis la eblecojn por alparoli kelkajn homojn en la nederlanda lingvo. Ili volonte kunprenis hejmen la „Esperanto sleutel" kun gramatiko kaj vortlisto de Esperanto Nederland.

La ekumena grupo de Berlino prizorgis la meblaron de la stando kaj ili ankaŭ aranĝis la ekumenan Diservon jaŭde la 29an de majo en Epiphanien-preĝejo, Berlin-Charlottenburg Knobeldorffstr. 72. La katolika pastro Albrecht KRONENBERGER kaj la pastoro Stefan SASSENBERG gvidis kune la Esperantan Diservon. Enira kanto estis: „Belegas nun somer sezon" (*Adoru* 612), festa himno (*Adoru* 343), Psalmo 118, Epistolo 1 Kor. 15:1-11, Haleluja, Evangelio Luk. 24:44-53, prediko, aliaj kantoj, kredo-konfeso, porpetoj, Patro Nia, Bena kanto, Beno Aarona, fi-

↳

**Prago, la 20an de julio 2003 ekumena Diservo kune kun pastro Albrecht KRONENBERGER, okaze de OSIEK–konferenco.**

## Prediko de Gerrit BERVELING

### Al la Koloseanoj 3:12–17

*12 Vestu vin, kiel sanktaj kaj amataj elektitoj de Dio, per delikata kompatemo, boneco, humilo, mildo kaj pacienco. 13 Toleru unu la alian, reciproke pardonu vin, se vi havas plend–kialon unu kontraŭ la alia. Kiel ja pardonis vin la Sinjoro, tiel <pardonu> ankaŭ vi.14 Al ĉio ĉi aldonu la amon, kiu estas la perfekta ligilo. 15 Kaj la Mesia paco regu en via koro; ja al tio vi estis vokitaj, kiel membroj de unu korpo.*

### Evangelio laŭ Mateo 5:38–48

*38 Vi aŭdis, ke estis dirite: Okulon pro okulo, kaj: Denton pro dento.*

*39 Sed mi diras al vi, ke vi ne rezistu la malbonan; sed se iu vin frapas sur la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian; 40 kaj kiu volas kontraŭ vi procesi por forpreni vian ĥitonon, lasu al li ankaŭ vian mantelon; 41 kaj kiu devigas vin je unu mejlo, iru kun li du! 42 Donu al kiu vin petas pri io, kaj kiu deziras lupreni ion de vi, ne forturnu vin de tiu. 43 Vi aŭdis, ke estis dirite: Vi amos vian proksimulon kaj malamos la malamikon.*

*44 Sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn kaj porpreĝu por viaj persekutantoj; 45 tiam vi fariĝos filoj de via Patro en la ĉieloj. Ĉar sian sunon Li igas leviĝi por malbonuloj kaj bonuloj, kaj Li pluvigas sur justulojn kaj maljustajn. 46 Ĉar se vi amos viajn amikojn, kian rekompencon vi akiros? Ĉu ne same faras la impostistoj? 47 Kaj se vi amos nur viajn fratojn, kion ekstran vi do faros? Ĉu ne same faras la paganoj? 48 Do vi estos perfektaj, kiel via Patro ĉiela estas perfekta.*

Fratinoj kaj fratoj,

La aŭtoro de la letero al la Mesia komunumo de Koloso, ĉu estis Paŭlo, ĉu ne estis — ne gravas —, en la hodiaŭ legita fragmento admonas siajn kunfidulojn, ke la Mesia paco regu en la koro. Ke la homoj vestu sin — ne, kiel diras la letero al Efezo, per tuta armaĵo: ŝildo, glavo, kasko — eĉ se nur spiritaj; — ne, ĉi tie li admonas nin vesti nin per delikata kompatemo, boneco, humilo, mildo kaj pacienco. Delikata kompatemo: preskaŭ sonas Budhisme: la kompatemo tut–unue: komprenante, se estiĝas problemoj, ke ankaŭ la aliaj ja estas -samkiel ni mem — nur homoj neperfektaj, ke ankaŭ ili samkiel ni ofte suferas, eble eĉ sammomente — se ne samkiale — suferas kiel ni. Kompatemo volas diri: mi konscias, ke ni homoj — ni ĉiuj — estas neperfektaj, kaj ke tial ofte eĉ sen deziri tion, ni vundas unu la alian.

Sed ni ankaŭ estas invititaj esti bonaj, humilaj, mildaj kaj paciencaj...

Tio sonas, kvazaŭ kristanismo estas eble tro granda tasko, neniam plenumebla. Ĉar esti bona — nu, kiu tion ne volas? Ja ĉiu volas esti bona — sed ho ve: kio estas, esti bona? Kaj humila — ne, tion ni nunuloj apenaŭ povas gluti: ni ne estas malpli valoraj ol la ceteraj! Pli realisme sonas, kion poste li diras: Toleru unu la alian, reciproke pardonu vin, se vi havas plend–kialon unu kontraŭ la alia. Do, ĉu en tio sumiĝus kristana sinteno?

Se la evangelion ni aŭkultas, en la hodiaŭa legaĵo, — etan fragmenton el la t.n. Prediko desur la Monto — ni aŭdas, kiel Jesuo citas el la Torao, aŭ el ties buŝe transdonata variaĵo, — kaj kiel li kontrastigas tion kun propra eldiro, ofte iom provoka.

Vi aŭdis, ke estis dirite: Okulon pro okulo, kaj: Denton pro dento. Jen Torao — por preventi, ke la homoj venĝante sin al la aliaj, ekstermu sin reciproke: „okulon pro okulo" ja estas klara limigo de la homa venĝemo.

Ne faru pli da malbono ol vi mem suferis. Jam saĝa komenco por atingi pli humanan societon.

— Sed mi diras al vi, ke vi ne rezistu la malbonan; sed se iu vin frapas sur la dekstran vangon, turnu al li ankaŭ la alian; kaj kiu volas kontraŭ vi procesi por forpreni vian ĥitonon, lasu al li ankaŭ vian mantelon; ktp, ktp...

Jesuo defias siajn sekvantojn ke iamaniere ili provu fari pli ol kio kutimas — pli ol nepre necesas. Se vere mondon ni deziras kiu estos bona por ni homoj, ni ĉiuj, — tiam ne sufiĉas fari la absolutan minimumon. Tiam almenaŭ de temp' al tempo ni devos fari pli.

— Vi aŭdis, ke estis dirite: Vi amos vian proksimulon kaj malamos la malamikon. Jen Torao kun aldonita vostaĵo tute laŭ nia homa naturo [ni ne ŝajnigu kvazaŭ tio estus tipe Juda, ne kristana regulo]: ni homoj ja ofte tiel pensas: ni estu singardaj kontraŭ la malamikoj — ni malamu tiujn prefere ol fidi ilin.

— Sed mi diras al vi: Amu viajn malamikojn kaj porpreĝu por viaj persekutantoj; tiam vi fariĝos filoj de via Patro en la ĉieloj. Ĉar sian sunon Li igas leviĝi por malbonuloj kaj bonuloj, kaj Li pluvigas sur justulojn kaj maljustajn.

Do, kvazaŭ Jesuo petus nin tute ne distingi inter la homoj, eĉ ne rimarki kiu estas amiko, kiu malamiko — donu kion bezonas la homo — kiel Dio faras pri sia pluvo kaj sia suno. Ĉu eblas vivi tiel? Ĉu tion — laŭlitere tion — deziras Jesuo? Ja ne eblas!

— Ĉar se vi amos viajn amikojn, kian rekompencon vi akiros? Ĉu ne same faras la impostistoj? Kaj se vi amos nur viajn fratojn, kion ekstran vi do faros? Ĉu ne same faras la paganoj?

— Do vi estos perfektaj, kiel via Patro ĉiela estas perfekta.

Jen la unuavide home neebla defio: se vere ni kredas ke Dio estas amo, — tiam ni vivu el amo; se ni kredas ke Dio estas bona, ni estu bonaj; se ni kredas ke Dio estas perfekta, do jen: nova idealo stre-

---

↳ na kanto en latina „In cymbalis bene sonantibus", signifas „Kun cimbaloj bone sonantaj", Krist' per la Dia forto sin levis el la morto (*Adoru* 329). Post ĉi tiu Diservo oni invitis nin kune trinki kafon, teon aŭ limonadon kaj manĝi multajn bonegajn kukojn. Ne nur esperantistoj partoprenis la Diservon, sed ankaŭ neesperantistoj.

Entute partoprenis 200.000 partoprenantoj en la eklezoiaj tagoj en Berlino.

Pro la fakto, ke mi ofte estis en la stando, ne eblis al mi partopreni multajn eventojn, sed eblis iri al „Gedächtniskirche" por ĝui la kantadon de multaj korusoj. Ili kantis multajn diversajn melodiojn de *Stabat Mater* kaj *Patro Nia*. Ankaŭ okazis korusvespero en kiu ni aŭskultis multajn korusojn, orgenludadon k.a. instrumentojn. La etoso estis grandioza.

Fine en Herzberg (2a pentekosta tago) okazis speciala Diservo de multaj homoj, kiuj loĝas en Herzberg, speciale pri la temo de la Ekumenaj Ekleziaj tagoj en Berlino. Ankaŭ mi partoprenis en tiu Diservo kompreneble, ĉar mi tiam estis en Herzberg.

Gerda DERCKS

# EKSKURSO AL RAVENNA

## Raporto de la ekskursa tago de la 16a Ekumena Esperanto-Kongreso en Rimini, 2003

Merkredo ĉiam estas la tago de la tuttaga ekskurso en niaj kongresoj. Ĉar la kongreso okazis en Rimini, estis tute kompreneble por la organizantoj, ke la ekskurso devas esti al Ravenna. Bonega decido estis! Pri Ravenna ĉiuj jam aŭdis, multe ankaŭ vidis, sed tiu ne-enuebla urbo estas perfekta loko por miri la artaĵojn, kaj pensi pri la riĉa tradicio de la kristanismo.

Ĉar la gekongresanoj estis multaj, ni iris per kvar busoj. Dank' al Duilio Magnani, la loka organizanto de nia kongreso en Rimini, ĉiuj jam havis skizon de Ravenna inter la dokumentoj. Tiu papero — esperantlingve — indikis la lokojn kiujn ni intencis viziti dum la tago.

Kiam ni alvenis en la urbo-centro, unue ni promenis al la belega preĝejo de San Vitale. Tiu 6a jarcenta preĝejo havas belegajn mozaikojn en la apsido, inter aliaj Kristo kun sanktuloj, kaj Bibliaj scenoj. Tuj apude estas la eĉ pli malnova maŭzoleo de Galla Placidia, kun 5a jarcentaj ŝton-tomboj, kaj belegaj mozaik-ornamaĵoj.

Post tiuj mirindaj monumentoj, ni vizitis la Baptejon de Arianoj, kiu estas ornamita en la plafono per la sceno de la bapto de Kristo. La Arianoj estis kristanoj, kiuj kredis ke Jesuo ne estas egala kun Dio kaj kun la Sankta Spirito. Ĉar en Ravenna, antaŭ la (katolika) kristana reĝado estis ankaŭ arianaj cezaroj, kelkaj preĝejoj restis el tiu tempo, sed, kelkfoje transformitaj.

Restis ege interesa memoraĵo en ĉiu koro nia protestanta diservo en la preĝejo Santo Spirito. La pripensigaj vortoj de Jacques Tuinder kaj la bela Taizé-stila, esperantlingva kantado bonege helpis nian meditadon.

Post la diservo jam estis tempo por la malfermo de la lunĉ-pakaĵoj. Sinjoro Magnani organizis ankaŭ sidlokon por ni en ĉarma memserva restoracio en la urbocentro.

Posttagmeze ni havis ankoraŭ multe da vidindaĵoj: en la Ĉefpreĝejo de Ravenna ni vidis bonkvalitajn 4a- kaj 5a-jarcentajn sarkofagojn. Apud la Ĉefpreĝejo estas la episkopa muzeo, kun mirindaj artaĵoj el la historio de la urbo.

La lasta komuna vidindaĵo estis la preĝejo San Francisko. Interesa estis, ke en la kripto de tiu pregejo estas akvo, sed tra la akvo videbla estas la malnova plank-dekoraĵo, mozaiko el la malnova preĝejo.

Post tiuj vidindaĵoj kelkaj ankoraŭ iris viziti la faman maŭzoleon de Teoderik, kies kupolo estas farita el unu sola ŝtono. Ĝia diametro estas 11 metroj (!).

La tempo bedaŭrinde rapide pasis, sed ni estis feliĉaj ĉar ni povis viziti la plej gravajn vidindaĵojn de tiu belega urbo.

**Zoltán Somhegyi**

---

↳

binda: tiam ni tutforte klopodu esti perfektaj.

Sed — avertas la apostolo — vestu vin ja per delikata kompatemo, boneco, humilo, mildo kaj pacienco — ne nur konfronte al la aliaj, sed ankaŭ koncerne vin mem.

Ĉar tuj kiam ni — eĉ home neperfekte — pardonas, Dio nin pardonas... Amen.



## Prelego pri la mozaikoj de Ravenna

Mi salutas vin ĉiujn. En mia prelego mi ŝatus diri al vi kelkajn vortojn pri la mozaikoj de Ravenna. Mi kompreneble scias ke la originala titolo de mia prelego — en la programo — estis Nord-Itala arto de mezepoko. Sed mi pensas ke estus pli bone se mi — aŭ ni — elektus nur unu temon kaj mi parolos pli detale pri ĝi. Do, tial mi elektis la temon de la mozaikoj de Ravenna, ĉar mi vidis en la programo ke postmorgaŭ ni iros tien, kaj vidos ilin. Tio ankaŭ signifas, ke mi devas atenti, kaj mi ne povas diri ion ajn, ĉar vi povos min kontroli.

Mi multe pensis kiam komenci la historion. Por bone vidi la situacion kaj la historian fonon de tiu epoko, mi decidis ke mi komencos malproksime, sed mi estos rapida. Do, mi dirus kelkajn vortojn pri la epoko post la morto de Jesuo Kristo.

Vi certe scias, ke la naskiĝo de la kristanismo ne estis facila. Post la ĉieliro de Kristo la apostoloj komencis instrui la evangelion, sed la instruo de Jesuo — kaj mem la monoteismo — ne plaĉis al Romo, kiu en tiu momento regis super la tuta Mediteraneo, do ankaŭ super Israelo. La cezaroj persekutis la kristanojn dum preskaŭ tri jarcentoj. La plej grava problemo por la kristanoj estis la neakceptebla dekreto de la cezaroj, ke ili, la cezaroj devis esti kultitaj, kaj la popolo devis doni oferaĵojn al la statuoj de cezaroj, kiel al dioj. Sed la kristanoj konis, aŭ rekonis nur unu Dion, do kompreneble ili rifuzis la oferon al la cezaroj. Tio estis la kialo de la persekutoj.

Sed la unuaj tri jarcentoj ne nur estis la jarcentoj de persekutoj, sed estis ankaŭ la periodo kiam la fundamentaj doktrinoj de la religio, kaj la kanonigita Biblio estis farita. Iom pli paca periodo por la kristanoj komenciĝis nur en la 4a jarcento: En la fino de la tria jarcento cezaro Diokleciano decidis fari reformon en la administrado de la imperio: li dividis la imperion en kvar partojn. Tio estis la periodo de tetrarkoj (kvar cezaroj). Iom poste Konstanteno fariĝis sola cezaro: du aliaj cezaroj abdikis, kaj li, Konstanteno militis kun la tria cezaro en 312. Tiu milito estis tre grava ankaŭ en la historio de kristanismo. Dum la nokto ĵus antaŭ la batalo Konstanteno vidis sonĝon: li vidis krucon, kaj aŭdis voĉon: „en tiu signo vi venkos". Li komprenis sian sonĝon, kaj la venontan matenon li pentrigis ĉien krucojn. Kaj, li venkis! Post tiu batalo li eldonis dekreton (313, en Medioleano, hodiaŭ Milano), en kiu li donis kompletan religian liberecon al ĉiuj en la Imperio. Lia alia grava ago estis, ke, en 330 li ŝanĝis la nomon de Byzantium al Constantinopolis (Konstantinopolo), kaj li faris la urbon dua ĉefurbo de la Imperio, kristana ĉefurbo anstataŭ la pagana Romo.

Iom pli ol duon jarcenton post la morto de Konstanteno, en 391 Teodozio faris kristianismon oficiala ŝtata religio de la Imperio. Tio signifas ke ĉiu alia pagana religio estis malpermesita ekde tiu tempo. Post la morto de Teodozio liaj filoj dividis la Imperion je du partoj, Orienta kaj Okcidenta parto. La ĉefurbo de la Orienta Imperio estis Konstantinopolo (ĝis 1453, kiam la turkoj okupis la urbon, kaj ŝanĝis la nomon je Istanbul) kaj la ĉefurbo de la Okcidenta (kaj barbara) Imperio estis Ravenna por iom da tempo, poste tio estis Romo. Sed en 476 la barbaroj okupis la Okcidentan Imperion, do la

Okcidenta parto ĉesis, tute kaj eterne.

Sed, la Orienta parto de la Imperio, nomita Bizanco komencis prosperi. La unua prosper-periodo estis dum la cezareco de Iustinianus (Justiniano, 527-565).

La deziro — aŭ dezirego — de Justiniano estis unuigi la du partojn de la Imperio, kaj denove havi fortan Romian Imperion. (Sed tio ne estis la ***renovatio imperii*** kiel la deziro de Karlo la Granda en 800.) En Bizanco en la 6a jarcento homoj pensis ke ili vivas en la Romia Imperio, nur la teritorio de la Imperio duoniĝis. Do, Justiniano volis reakiri la Okcidentan parton de la Imperio de la barbaroj. Por tio, li ĉesigis la militon kontraŭ la persoj (en la orienta parto de Bizanco), kaj koncentris siajn fortojn al la Okcidenta parto. Li faris sukcesajn militirojn: en 535 li akiris Nord-Afrikon, en 553 Italion. en 554 Sud-Hispanion. Li faris fortostreĉojn ankau por fortigi la imperian administracion: ĉirkaŭ 530 li faris legolibrojn (***Codex Iustinianus, Corpus Juris Civilis***). Lia fama militestro, Belizaro estis kiu konkeris Ravennon en 540.

Nun kelkaj vortoj pri la urbo Ravenno mem: en la dua jarcento antaŭ Kristo la Romia Imperio konkeris tiun urbon de la etruskoj. Cezaro Aŭgusto elektis (jam en la unua jarcento) la havenon de Ravenna por sia Okcident-Mediteranea ŝiparo kiel centra haveno. Mi jam menciis, ke post la divido de la Romia Imperio, Ravenna fariĝis la ĉefurbo de la Okcidenta parto, de 402 ĝis 476, kiam la barbaroj konkeris ankaŭ ĉi tiun urbon. En la urbo oni trovas plurajn preĝejojn kun mozaikoj.

Sed en la titolo de mia prelego mi uzis du „fremdajn" vortojn, kaj mi nun klarigis nur unu el ili, ***Ravenno***. Do mi devus ankorau diri kelkajn vortojn pri la tekniko kaj historio de ***mozaikoj***, ĝenerale: la vorto mozaiko venas el la latina, sed originale estas araba, kaj signifas: ***enmetita***. Tio — kompreneble — koncernas la teknikon: la mozaik-faranto enmetas la malgrandajn pecojn de ŝtonoj (marmoro, vitro) en la „ligo-masso".

La antikvaj grekoj uzis la mozaikon nur por planko-dekoraĵo. Ili faris nur ŝton-mozaikon, kaj la ornamaĵo havis nur geometrajn formojn. Kiam poste en la Romia Imperio la vitra-mozaiko estis eltrovita, la majstroj komencis fari bildojn kun figuroj, do mitologiajn scenojn. Je la tempo de la persekutoj, la kristanoj renkontiĝis en sekretaj katakomboj, tio signifas en artefaritaj kavernoj, kie ili havis kiel dekoraĵon nur pentraĵojn. Ĉar la mozaiko estas tre malfacila kaj ege multekosta tekniko, je la tempo de laŭvorte „***underground***" kristanismo, ili ne povis fari mozaik-bildojn. En la sekvaj jarcentoj la cezaroj aŭ la episkopoj donis financan helpon al la preĝejoj por fari tiajn multekostajn dekoraĵojn.

Esploristoj diras, ke kvankam multe da monumentoj de Ravenna kun mozaikoj estis jam konstruitaj dum la bizanca regado, la majstroj estis italaj. Tio signifas, ke ili ne venis de Bizanco, ĉar la organizo de la italaj mozaik-majstroj estis tiel forta, ke la (novaj) bizancaj „oficistoj" komisiis la italajn mastrojn, kaj ne invitis bizancajn. Nur, la modeloj estis bizancaj: kompreneble la formo aŭ la stilo devis esti „bizanca". Do, la majstroj havis malgrandajn art-aĵojn (ebur-skulptetoj, miniaturoj) laŭ kiuj ili devis kopii la formon kaj stilon, entute: la manieron aŭ karakteron de la bizanca arto.

**Zoltán SOMHEGYI**



## Libera Eŭropa Universitato de AIS Academia Kelemantia en Komarno (SR)

En la centro de Eŭropo landlime de tri ŝtatoj (Aŭstrio, Hungario, Slovakio), surborde de la Danubo kaj Vaho, en urbo Komarno baziĝas Libera Eŭropa Universitato — „Academia Kelemantia". Ĝia nomo korespondas kun nomo de historia fortikaĵo Kelemantia, kiu precize sur tiu ĉi loko konstruis la Romanoj. Academia Kelemantia jam ekde la oktobro 2003 komencas kun preparo de altkvalifikitaj specialistoj por la unuiĝinta Eŭropo — tio estas la specifa trajto por la tuta studadprocedo en la Universitato. Ĝuste pro tio la instru-lingvo tie ne estos ĉiuj eŭropiaj lingvoj, sed neŭtrala planlingvo de doktoro ZAMENHOF sub la nomo La Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto (ILo). Tiu ĉi lingvo estas la ĉefa laborlingvo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kiu ĝi provis dum pli ol 20-jara uzado en instruado kaj en ĉiuj branĉoj de mondaj sciencoj. La AIS konstatis, ke en siaj esprimaj eblecoj ILo malsuperas neniun el la mondaj lingvoj. Por studi ĝin laŭ la ellaborita en AIS metodo sufiĉas 1-2 semajnoj por ke la instruprocedo estu sukcesa. Abiturientoj el iu ajn EU-ŝtatoj kaj aliaj kiujn ne posedas ILon altkvalifikitaj instruistoj lernos ĝin aŭ senpere en Komarno antaŭ ie ajn, sed antaŭ la komenco de la instruprocedo ili devos monti ateston aŭ fari lingva ekzameno. Instruado en la Universitato okazos en la ĉefa branĉo **„Fremdaj lingvoj kaj kulturoj" kun specialiĝoj: manaĝerado, interlingvistiko, turismiko, komunikadkibernetiko.** Daŭro de la studado estos ekde 3 ĝis 6 jaroj depende de la klerecnivelo de la abituriento kaj elektita nivelo de studo (bakalaŭro, magistro, doktoro).

Komence okazos distanca formo de studo (precipe interreta) studado kun jare 2-4 semajnaj renkontiĝoj kun la profesoroj en Komarno. La Universitato pasigas ankaŭ mallongajn (1-2 monatajn) eŭropajn kursojn plialtigajn la kvalifikon de specialistoj. Instruadon efektivigas ne nur eŭropaj profesoroj kaj docentoj, sed ankaŭ pedagogoj el ĉiuj mondregionoj. Inter ili estas Nobelpremiito pri ekonomiko Reinhard SELTEN (Germanio — rektoro de la Universitato Komarno); profesoro pri klerigkibernetiko, AIS-prezidanto Helmar FRANK (Germanio); profesoro pri matematiko Carlo MINNAJA (Italio); profesoro Humphrey TONKIN (Usono); direktoro de la ĉina scienckomitato profesoro CHEN Yuan (Ĉinio), akademiano Arkadij ZAKHAROV (Rusio) k.a.

Finstudinto de la Universitato ricevos diplomon, agnoskotan en ĉiuj eŭropiaj ŝtatoj krome en la slovaka lingvoj ankaŭ de la aliaj lingvoj AIS (Ilo kaj la angla, franca, germana, itala) kaj en la nacia lingvo de la finstudinto. Finstudinto havos rajton labori en ŝtataj kaj neŝtataj institucioj de Eŭropio kaj aliaj mondregionoj.

Kosto de unu studadjaro estas 2.400 eŭroj. Laŭ la deziro de studento eblas pagi po studjaro aŭ tuj por la tuta studperiodo.

La Libera Eŭropa Universitato en Komarno bonvenigas abiturientojn, kiuj havas mezan aŭ superan klerecon.

Por la studjaro 2003/2004 enmatrikuligo okazos de la 1a de junio ĝis la 1a de de septembro 2003. Studoj komenciĝos en oktobro 2003.

Por la aliĝo bezonatas pasporto, dokumento pri klereco, 2 fotoj 3x4 cm.

## LUMO AŬ MALLUMO

Mallumo ne povas forpeli mallumon;
nur lumo havas tiun kapablon.
Malamo ne povas forpeli malamon;
nur amo havas tiun kapablon.

Malamo kreskigas malamon;
perforto kreskigas perforton,
kaj fieco kreskigas fiecon
en spiralo subeniranta
kaj neniiganta.

La ĉenreakcion de malbono
— malamo naskanta malamon
militoj kaŭzadantaj
novajn militojn —
vere necesas rompi.

Ĉar la alternativo:
nin ĵeti en la mallumon
de pereo kaj ruiniĝo.

Martin LUTHER KING (1929–1968)
tradukis: Jacques TUINDER

---

Kondiĉo por aliĝo al la universitato estas lingva kompetenco en ILo kaj unu alia fremda lingvo.

Informoj kaj aliĝoj:

Prof. Dr Eva POLÁKOVÁ
Vnútorná Okružná 67/14
SK–94501 Komárno
fakso: 00421/35/7705031
tel.: 00421/904/595015,
*421/908/757840
e–poŝto: **sebokzoltan@medicina.sk**
**epolakova@in.slovanet.sk**

## Rilatoj inter la kroata ŝtato kaj kristanaj eklezioj

La 4an de julio la kroata registaro subskribis kontraktojn kun la reprezentantoj de kelkaj kristanaj Eklezioj: Evangelia Eklezio, Reformita kristana Eklezio, Kristana adventista Eklezio kaj kun la Unuiĝo de baptistaj eklezioj en Kroatio.

Celo de tiuj kontraktoj estas plibonigi la kondiĉojn por la agado de tiuj Eklezioj edukkampe kaj kulture, ilian agadon en malliberejoj, malsanulejoj, armeo kaj polico.

Intensa laboro pri tiuj kontraktoj daŭris ses monatojn.

Similajn kontraktojn oni preparas kune kun la Juda komunumo kaj kelkaj aliaj malgrandaj naciaj religiaj grupoj.

La unuajn kontraktojn oni subskribis kun la Sankta Seĝo rilate al la agado de la Romkatolika Eklezio. Ĝuste la Romkatolika Eklezio insistis ke similajn kontraktojn la ŝtato subskribu kun aliaj Eklezioj kaj religiaj grupoj.

Dum la hodiaŭa ceremonio flanke de la registaro subskribis la ĉefministro.

Krom la reprezentantoj de la subskribantaj Eklezioj, la ceremonion ĉeestis la reprezentantoj de la Romkatolika Eklezio, Serba ortodoksa Eklezio, Muzulmana kaj Juda komunumoj en Kroatio.

Sendis: Marija BELOSEVIĆ

---

## Solvo de la krucvortenigmo

***horizontale:*** 1. difavoro, 7. Eva, 8. er, 9. st, 11. oro, 13. ĉiuj, 15. amo, 17. iuj, 18. azid', 19. ond', 21. lo, 22. la, 24. azi', 26. okazigas.

***vertikale:*** 1. disĉiplo, 2. fe', 3. avoj, 4. var', 5. re, 6. ortodoks', 10. tiu, 12. oaz', 14. ujo, 16. mil, 18. adzi, 20. naz', 23. a.K., 25. ig,

***kromsolvo:*** sinodo.



**Pastoro Axel Kühner, el libro „Transvivaj rakontoj"**

## FORKURO

Iam vivis imperiestro en Ĉinio. Iun vesperon li trapasis la florantajn terasojn de la imperiestra ĝardeno kaj ĝojiĝis pri la beleco de iliaj floroj kaj pri la odoro de la rozoj. — Jen rapidegis lia supera ĝardenisto, kiu suprenkuris la ŝtuparon kaj ĵetis sin en la polvon antaŭ la piedoj de la imperiestro. „Ho, potenca mastro, aŭdu min! Ĵus mi vidis, kiam mi akvumis la rozarbuston, la realan morton. Tie malantaŭ arbo li esplore rigardis kaj minacis min per la pugno. Certe li volas mian vivon. Pruntedonu al mi, mastro, vian plej rapidan ĉevalon „Zephir", kiu estas pli rapida ol la okcidenta vento, kaj permesu al mi, ke mi fuĝu al Tschanga, via plej malproksima palaco, kiun vi kaŝis en la montaro. Ankoraŭ antaŭ la leviĝo de la luno mi povus esti tie, kie la morto ne trovos min. — „Prenu la ĉevalon! Por protekti vian vivon oni devas ĉion riski".

La ĝardenisto rapidegis al la staloj. Baldaŭ oni aŭdis la arĝentan hufofrapon de la forkuranta ĉevalo. Pensante la imperiestro daŭrigis la promenadon. Sed subite ankaŭ li ekvidis proksime antaŭ si meze en la rozaro la morton. Sed la imperiestro ne estis timema kaj tuj alproksimiĝis kaj bruske alparolis lin: „Kial vi tiel timigis mian ĝardeniston kaj minacas miajn dungitojn antaŭ miaj okuloj?" La morto kliniĝis kaj diris: „Majesta mastro, pardonu ke mi vin kolerigis. Sed mi ne minacis vian ĝardeniston. Kiam mi ekvidis lin tiel neatendite antaŭ mi inter viaj rozoj, mi ne povis reteni miron. Ĉar hodiaŭ matene ordonis al mi la reganto de la ĉielo, iri por preni ĉi tiun vian ĝardeniston el via palaco Tschanga hodiaŭ vespere je la leviĝo de la luno. Tial mi miris, ke mi renkontis lin ĉi tie, tiel malproksime de tiu palaco".

Nun la imperiestro sin klinis respektoplene antaŭ la reganto pri vivo kaj morto kaj li longe rigardis en la kalikon de rozo pensante: 'Jen rapidegas la viro per la plej rapida ĉevalo, kiun neniu povas kuratingi, fuĝante la sorton li kuras renkonti sian sorton!'

*15 Ĉar tiele diras la Sinjoro, la Eternulo, la Sanktulo de Izrael: Per pento kaj trankvileco vi saviĝus, en kvieteco kaj fido estus via forto; sed vi ne volis. 16 Vi diris: Ne, ni forkuros sur ĉevaloj; tial vi forkuros; kaj: Sur rapiduloj ni forrajdos; tial rapidaj estos viaj persekutantoj.*

Jesaja 30:15–16
Tradukis: Siegfried KRÜGER

## FESTLIBRO POR ADOLF BURKHARDT PREPARATA

Okaze de la 75a naskiĝtago (2004–04–10) de Pastoro Adolf BURKHARDT, multjara prezidanto de KELI, aperos la festlibro **Esperante kaj Ekumene** en kiu kunlaboras teologoj, esperantologoj kaj interlingvistoj el pluraj landoj. La festlibro enhavos ankaŭ kompletan bibliografion de la publikigaĵoj de la jubileulo.

Laŭ la kutimo de tiaj libroj en la komenco troviĝas *Tabula Gratulatoria* (Listo de Gratulantoj). Ni invitas la kunlaborantojn, amikojn kaj konatojn de Adolf BURKHARDT enskribiĝi en la liston.

Bv. kontakti la eldonejon: Edition Iltis, BP 19, FR–84340 Malaucène, retpoŝto: Editioniltis@aol.com.

# LA DUA BALTA ESPERANTO -FORUMO

Tre riĉan klerigan programon havis la dua Balta Esperanto-Forumo, kiu okazis 17-22 jul 2003 en Olsztyn (Pollando) kun 55 partoprenantoj el ses landoj.

La ĉefan temon de la Forumo, „Slavaj influoj en Esperanto", laŭ la aspektoj lingva, movada, ideologia kaj kultura, prezentis Aleksander KORĴENKOV.

Aliaj prelegoj estis dediĉitaj al: Esperanto-vortaroj en la reto (Witold CZERWIŃSKI), interkultura komunikado per Esperanto kaj la angla (Ilona KOUTNY), EEU (Johan DERKS), Olsztyn (Elżbieta LEONOWICZ-FRENSZKOWSKA), Prusujo sen legendoj (Wolfgang KIRSCHSTEIN), nevidantoj (Irena ŁOWIŃSKA), „Solidareco" en Kaliningrad (Alen KRIS), nacia, eŭropa, internacia niveloj de identeco (Zbigniew GALOR), Siberio (Aleksej BIRJULIN).

Du jubileantaj libroj ricevis apartan pritrakton: la 100-jara „Fundamenta Krestomatio" (Halina GORECKA) kaj la 75-jara „La tajdo" de Nikolao HOHLOV (Aleksander KORĴENKOV). Nora CARAGEA rakontis pri siaj tradukoj. Sed la plej interesa literatura evento de la Forumo estis lanĉo de la „Rusa Novelaro", eldonita de „Sezonoj" en julio — la tuta stoko, kunprenita de la eldonantoj, estis rapide disaĉetita je speciala unuataga prezo, kaj la tri ĉeestantaj tradukantoj havis agrablan takson subskribi ĵusaĉetitajn ekzemplerojn.

Al la diskutrondo „UEA: de problemoj al krizo" skribe kontribuis Renato CORSETTI, István ERTL, Giorgio SILFER kaj Jakvo SCHRAM, kiuj diverstendence traktis la temon. Alia diskutrondo estis dediĉita al la Esperanta gazetaro ĝenerale kaj speciale al „La Ondo de Esperanto", kies pluraj redakcianoj, kunlaborantoj kaj legantoj ĉeestis. Aktivuloj el norda Pollando, Litovio, kaj Kaliningrada regiono havis plian sesion de la tradicia seminario pri kunlaboro en ĉi tiu regiono.

Ekskursojn gvidis la forumanojn al la urbo mem, kiu ĉi-jare festas sian 650-jariĝon, kaj al interesa pravilaĝo en Olsztynek. La streĉan laborprogramon variigis interkona vespero ĉe fajro kun kolbasetoj kaj biero, pola vespero en regionstila restoracio „Karczma Warmińska", orgena koncerto en la katedralo kaj la adiaŭa vespero en restoracio „Kolorowa".

Preskaŭ ĉiutage Marian ZDANKOWSKI amuzis kaj pensigis la ĉeestantojn en FREŜO — eble la plej fama kviza programo en Esperantujo.

La ĉefa riproĉo, kiun la kunorganizantoj (Varmia-Mazuria E-Societo kaj „La Ondo de Esperanto") ricevis en la lasta kunveno estis trostreĉeco de la programo, kaj por bani sin en la belaj (apud)urbaj lagoj oni devis malĉeesti interesajn prelegojn kaj kunvenojn.

**Halina GORECKA**
**„La Ondo de Esperanto"**